

VORTOJ PRI TRANSPLANTADO DE BANANUJO (1)

[El "La Krescenta Taglibro"(Mikazuki Nikki)]

Krizantemoj prospere floradis ĉe Tao Yuanming apud okcidenta heĝo, kaj bambuoj fariĝis la sinjoro por Wang Ziyou ekstere de norda fenestro. Peonoj estas jam makulitaj per mondaj polvoj, estante la objekto de vana disputo pri ĉu tiu aŭ ĉi tiu, kiu estas pli bela, la ruĝa aŭ la blanka. Lotusoj ne kreskas sur la ebena tero kaj ne floriĝas en malpura akvo.

En kiu jaro tio estis, kiam mi translokoĝis en ĉi tiu angulo, mi plantis unu draĵon de bananujo. Ŝajne, klimato konvenas al la naturo de bananujo, kreskiĝas kelke da tigoj, kaj la folioj amasiĝas spacokupe en ĝardeno, kovrinte eĉ aleron. Oni nomas la kabanon Basyoo-an per la bananujo. Malnovaj amikoj kaj disciploj kune amas ĝin, tial mi ĉiujare sendas al ili ĉien ajn la draĵojn, dividitajn de ĝia radiko.

En iu jaro mi intencis pilgrimadon al norda provinco Mitinoku kaj la banana ermitejo jam devis esti forlasota, tial do mi transplantis la bananujon en najbaran teron post la heĝo, kaj mi elkore petis ripete al najbaraj proksimuloj kovri ĝin dum prujno, ĉirkaŭbari dum vento, aldone mi restigis skribaĵon pri mia peto. Kiel versite de Saigyō,

La pino restos sola,

Se mi estos allogata al vojaĝiro,

Enuiĝonte de loĝado ĉi tie.

[Koko wo mata waga sumi ukute ukarenaba matu wa hitori ni naranto suran]
mi ankaŭ badaŭris ĉiam en la koro la bananujon dum fora vojaĝo. Pasis 5 jaroj post la disiĝo de najbaroj kun mia sopiro al bananujo kaj kun mia eksterordinara soleco, kaj denove revidante mian bananujon, mi ekverŝis larmojn. Ĉi-jare [1692], meze de kvina monato, kiam bonodoras floroj de taĉibano-citrono, oni konstruis por mi kabanon el tri ĉambroj proksime al la antaŭa ermitejo, ĉar ĉi tie ne ŝanĝiĝas amikeco kun homoj kaj ne eblas forlasi ĉi tiun lokon. Kun kolonoj el kriptomerio rabotita purege, pordoj el bambuo starigitaj trankvile, heĝo el kano dense plektita, la nova ermitejo staras al la sudo ĉe lago kvazaŭ observa turo sur akvo. La tereno situas kontraŭ la monto Huzi, kaj pordo staras flanke, por ke ĝi ne baru vidon. Komparante akvostarejon en Mitumata apud la estuaro de Sumida rivero kun tajdo de riverego en Zhejiang provinco, mi spektas lunon tiel ĝojege, ke jam en vespero de la tria tago mi timas, ĉu nuboj kaj pluvo kaŝus plenlunon aŭ ne. Kiel ornamo por bela plenluno, mi antaŭ ĉio transplantis bananujon. Ĝia folio estas longa je 7 futoj [2,1 metroj], duondetruita per blovado, kiel la vundita vosto de fenikso, aŭ ĉagrenata de vento kiel disŝirita ventumilo. Kelkfoje ĝi floras, sed ne pompe. La tigo estas dika, sed ne hakata de toporo. La naturo de bananujo estas

admirinda, tial ke oni ne hakas ĝin, senutilan en arbaro, kiel dirite de Zhuang-zi. Huaisu, la bonzo de Song dinastio, skribadis sur ĝia folio, kaj Zhang Hengqu akiris sian forton por studado, vidante la novan folion bona modelo por plialtiĝo.

Mi ne prenis ambaŭ du ekzemplojn. Mi nur sidas nenifare sub ĝi kaj amas ĝian naturon, rompiĝeman per vento kaj pluvo.

VORTOJ PRI TRANSPLANTADO DE BANANUJO (2)

[Laŭ la libro, kompilita de Dohou, “Kolekto de verkoj de Basyou (Syouou bunsyuu)”, kaj laŭ la libro “La insulo de Eterna Juneco (Yomogi ga sima)”]

Pli admirinde estas havi nenion en koro nek en sino, kaj plej admirinde estas havi nek kapablon, nek scion. Post tio admirinde estas sen loĝejo kaj sen ermitejo. La ŝtala koro, alligiĝinta al nenio, ne povas esti transportata per flugiletoj de kolombeto. En iu jaro forlogate de neatendita blovado de ciklono, mi atingis la marĝenon de norda provinco Dewa kun disrompita ĉapego el kameciparido. Fine, post kiam pasis tri jaroj, mi denove revenis al oriento de Edo, kaj sentas aŭtunan melankolion ĉe Mitumata, en malsupro de Sumida rivero, kaj verŝas nun larmojn al flavaj krizantemoj kiel antaŭe.

Dank’ al s-roj Sanpu kaj Kihuu estas konstruita la kabano, kaj s-roj Sora kaj Taisui klopodis por kurioza aranĝo. Ĝi staras kontraŭ sudo, por ke ĝi gardu de norda vento en vintro kaj helpu min refreŝiĝi somere en friska aero. Ĉe bordo staras la bambua balustrado de teraso, verŝajne, por ke oni bone spektu de tie lunon. Mi jam ekde krescenta vespero komencas esti maltrankvila ĉiuvespere, timante, ke pluvus aŭ nebus dum plena luno. Oni sendadis al mi ĉiu respektive vivnecesaĵojn, do rizoj abundas tiel, ke superrandiĝas el ujo, kaj de vino-sakeo pleniĝas sakebotelo.

Kun bambuoj plantitaj, kaj ĉirkaŭita de arboj, situas la ermitejo iom profunde. Aldone estas plantitaj kvin bananujoj por la ornamo de plenluno en 15-a de la oka monato. Iliaj folioj jam estas tiel longaj je 7 futoj, ke ili povus kaŝi eĉ muzikilon “koto”, aŭ ke per ili oni povus kudri sakon por bivo-liuto. Vento movigas iliajn vostojn, similaj al la feniksaj, kaj pluvoj fosadas ilin, farante truojn kvazaŭ oreloj de la blua drakono. Novaj folioj ĉiutage tiel disvolviĝas, ke la ĉino de Song periodo, s-ro Hengqu, admiris tion kiel la modelo de intelekta progreso, kaj por ke la ĉina juna kaligrafo de Tang periodo, Huaisu, ekzercu sin en skribado sur ili. Mi ne imitas du ĉinojn. Nur sub la folioj ripozante, mi amas la rompiĝemecon pro ventoj kaj pluvoj.

Sur kolono pendiginte,
Mi lunon de ermitejo spektas.
[Basyooba wo hasira ni kaken io no tuki]

VORTOJ PRI TRANSPLANTADO DE BANANUJO (3)

[El la libro de Kawaguti Tikuzin “Tuta biografio de Basyoo”, ĉap. de “Notoj pri tiama restarigo de la Ermitejo en Hukagawa”]

La malnovan bananan ermitejon[,kiu forbrulis en 1682] konstruis unue s-ro Yamaguti Sodou por esprimi la vivkoncepton de malriĉa loĝanto [t.e. Basyoo], tiam por tio kolektis fondaĵon s-roj Kikaku kaj Issyou poiom ĉe la amikoj-amantoj de la belartoj. Ĉi-jare, en somero de 1691, s-ro Sanpū unu sola fariĝis la kvestodonanto, kaj s-ro Kihū iomete helpis en fondaĵo, estas konstruita la kabano kun tri ĉambroj apud la bordo. Pri aranĝo de loĝejo s-roj Sora kaj Taisui okupiĝis laŭ sia prefero. Ĝi staras kontraŭ la sudo por ĝui freŝan friskan aeron. Lunlumo speguliĝas sur lago kaj poste lumigas tatamon sur la planko de ermitejo, kaj [samkiel versite de Dufu en lia poemo “Luno” :] “Aŭroro sur la akvo kaj sur la palaco prezentas nubon de elkrepuskiĝo”. Kiam mi sentas ekblovantan aŭtunan bonodoran venton, mi jam ekde la tria vespero de la oka monato timas pluvon kaj malamas nubon. Kiam proksimiĝis dek kvina vespero, mi transplantis la bananujon kaj nomis la kabanon denove la ermitejo de bananujo [Basyoo-an]. . Iliaj folioj jam estas tiel longaj je 7 futoj, ke ili povus kaŝi eĉ muzikilon “koto”, aŭ ke per ili oni povus kudri sakon por bivo-liuto. Vento movigas iliajn vostojn, similaj al la feniksaj, kaj pluvoj fosadas ilin, farante truojn kvazaŭ oreloj de la blua drakono. Novaj folioj ĉiutage tiel disvolviĝas, ke la ĉino de Song periodo, s-ro Hengqu, admiris tion kiel la modelo de intelekta progreso, kaj por ke la ĉina juna kaligrafo de Tang periodo, Huaisu, ekzercu sin en skribado sur ili. Mi nur deziras varti la bananujon [basyoo], kaj kompatas ĉiutage ĝian rompiĝemecon.